

# HIS JUNA




HISPANA ESPERANTA  
JUNULARA SEKCIO

© KOPIRAJTO ĈE MI. (G.K.K.)

HISPANA ESPERANTA  
JUNULARA SEKCIO

**N-ro 116**

SEPTEMBRO  
1.982



ATOCHA, 98-MADRID-12 (Hispanio)

Cefredaktoro: Francisko Ksavero Moleon'  
Vicredaktoro: Georgo Kamaĉo (G.K.K.)  
Kasisto: Jorge Bueno

Kunlaborantoj: Ana Maria Ranero, Juan  
Carlos Gutiérrez, M.A. Sancho Pardo,  
S. Ricarte, Fernando Soler, Anĝelo,  
La laboratoriestro kaj Porkĉjo.

INDEKSO

Paĝo 3	.....	tendaro en E-0
" 4	.....	Leteroj al la Dir.
" 5	.....	Romanco de Amparo
" 8	.....	Kontrakto kun Koncize
" 10	.....	La foto
" 12	.....	El la estraro
" 13	.....	"Jogging-o"
" 16	.....	Diversaj informoj
" 17	.....	Kongresa foto
" 18	.....	Redakcia noto
" 19	.....	Legendaĵoj
" 20	.....	Pliaj legendaĵoj

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoro mem. La redaktistaro pretas lingve korekti ĉiujn kunlaboraĵojn prozajn, sed ne la versajn por ne ŝanĝi la originalajn rimon kaj ritmon.

# ĈI TIE VENONTJARE:

(okazos...!!!)

LA VII<sup>A</sup>

HISPANIO

-TENDARO


## ESPERANTO - OAZO

Kampadejo por ferio kaj  
praktiki esperanton

KLARIGU POR ATINGI LA E-0

1- Gandfa. 2- Eniru la vojon al vilaĝo  
Barig. 3- Eniru maldekstran disvojiĝon  
5 Km for de Gandfa. 4- Vojforko. Iru  
maldekstren. 5- Disvojiĝo. Iru maldek-  
stren. 6- Disvojiĝo. Iru dekstren.  
7- E-0.

Malformita bakjaro



La E-0 situas en hispana orangerie-  
gardeno, 10 Km for de la strando  
de Gandfa (Valencia). Verma akva  
sportejo, kahelita naĝejo (6x12).

Prezoj (1 nokto): 100 p/persono  
(50 p/infano aŭ senlaborulo);  
100 p/tendo, rulaomo, aŭto.

POSTADRESO: Akiles Sanz / Apartado 171  
Gandfa (Valencia) - HISPANIO

DUMPASKE, NE FORGESU...

# LETEROJ AL LA DIR.:

LABORATORIOJ "BONAEROJ" A.S.

Estimata Sinjoro:

Ni havas la plezuron skribi al vi por submeti sub vian konsideron la enhavon de la studado de nia aparato "PUGOTRONIK", patentita kaj aprobita de la Aŭtoritatoj de 45 landoj, kiu venas por plenumi la plej sentatajn publikajn necesojn, kaj kiu estas nuntempe uzata de milionoj da klientoj kiuj ĝin dankas kaj laŭdegas.

La aparato "PUGOTRONIK" estas malgrandega ilo kiu aplikita je la anuso de la furzemaj personoj, forigas la bruon, kiom ajn surdiga ĝi estas, kaj transformas la plej grandegan furzon en flaron de bongustemaodoro. Kaj havinte informojn de nia Informoficejo pri --tio ke vi estas senlaca furzulo, tial ni permesas nin skribi al vi por vin komuniki ke post nelonge vin vizitos unu el niaj agantoj por mezuri vian respektindan postajon.

Nia lasta eksperimento estis realigita je elefanto kiu, kiam eksplodis terura furzo, incensumigis la medion per mildaj parfumoj de jasmenoj kaj violoj.


Ni havas gamon da modeloj kun perfortaj fluadejoj tiel kiel grandan gamon da aparatoj "PUGOTRONIK" kun la lastaj novaĵoj por buljonaj furzoj, kun aplikita --ilo de automata sekigo, kaj krome fakon por la post--restaĵoj kaj pugrubaĵoj. Ni havas ankaŭ geinfanajn mode--lojn.

Per la malgranda sumo de 26 senvaloraj pesetoj, --ni aldonas al la aparato "PUGOTRONIK" muzikan suple--menton kun partoj de operoj, operetoj, mambo, ĉa--ĉa--ĉa, ktp, per kiu vi povos, dum vi eksplodigas, aŭskulti la partituron de via prefero aŭ tiun de via fami--lio.

Ni petas al vi, ke vi atendu nian komerciston kun via postaĵo en perfektaj higienaj kondiĉoj.

Ĝis nia vizito al ni plaĉas vin aĝente saluti:

LA LABORATORIOESTRO.



# ROMANCO DE AMPARO

Gepatroj, kiuj gefilojn havas  
gefiloj, kiuj havas gepatrojn,  
por ke ŝi ne ripetu denove,  
aŭskultu tion, kio Amparon  
okazis: terura historio.

Amparo naskiĝis en tre bela  
vilaĝo valencia, Moncada  
nomata. Ŝi, infanino, ludis  
kun geamikoj inter mallarĝaj  
stratoj el ŝtonaroj pavimitaj.

Jam, junulineto, ŝi tendumis  
gaje en la silvoj de l' montaro  
kaj banis sin en la rivereto.  
Fine, ce l' bordo de blua lago  
ŝi renkontis sian amon veran.

Sed, tiuj tempoj ne estis bonaj  
por nia ego enamiĝanta;  
prezoj plialtiĝas kaj salajroj  
restas senmovaj pro "nekonata  
kaŭzo, laŭ diro de l' registaro.

Panjo diris al sia filino  
ke ŝi iros Valencion, granda  
urbo, por servi ĉe la domo  
de familio riĉa kaj fama,  
por mone helpi al la gepatroj.

Amparo ne timis laboradi,  
nek teruris al ŝi la gemajstroj  
el la domog' ĉar ŝi estis brava  
fraŭlino kun animo el amo  
plena, kaj multe da memestimo.

Jus, alveninte la domogon,  
aperis por ŝi, problemo grava:  
ŝi devis esprimi siajn pensojn  
ne valencilingve, sed per stranga  
kastilia lingvo, nova por ŝi.

Malfeliĉan tagon, tragedio  
alvenis pro malprudenta ago.



Si diris hazarde al mastrino:  
"Que em vaig a acostar als meus paisanos".  
Tiu frazo estis la komenco.

"Kia fivirino estas tiu  
kiu tiel facile metadas  
en sian liton, virojn de sia vilaĝ'.  
Kia ekzemplo tre malmorala,  
nek tagon ŝi ŝaŭros en la domo".

Amparo ploradis kaj ploradis,  
kriadis kaj kriadis la mastro,  
la mastrino svenis kaj terfalis,  
konsterno invadis la infanojn.  
Por Amparo ĉio teruregis.

Amikino diris al Amparo:  
"Venu kun mi al Parizo rava,  
tie vi gajnos pli multan monon".  
Al Parizo, Amparo malgaja  
veturis, plena de espero.

Ĉe Parizo, en bela domo  
tenata de geedzoj, Amparo  
laboris. Ŝi havis grandan sorton  
ĉar ili ne havis geinfanojn  
kaj estis ĝentilaj kaj afablaj.

Tie, pro la lingvaj diferencoj,  
ankaŭ estis problemegoj gravaj,  
ĉar Amparo ĉiam paroladis  
ekde sia infanec', ne francan,  
sed valencian lingvon naskiĝa.

Sed, tre tristan tagon, la mastrino  
petis al ŝi, ke por la manĝaĵo  
ŝi enmetu "poisson". En ŝranketo  
apud kuirej' vidis Amparo  
poton kun la vort' skribita "poison".

Si metis la "poison" en manĝaĵon,  
nesciante, ke ĝi estas granda  
veneno, ne fiŝaĵo, kaj mortis  
senrimede la gemastroj karaj  
kun granda surprizo por Amparo.

Amparon kunportis kaj enĵetis  
en malliberej' la policianoj

kaj Amparo ploris kaj ploradis  
dum longaj noktoj, noktoj kaj jaroj  
senĉese kaj kun nenia kompato.

Ci tie finiĝas historio  
de Amparo, la unue gaja  
kaj ama virin', kiun transformis  
la lingva baril', la turo alta  
de Babelo, en personon mortan.

Vi ĉiuj: gepatroj kaj gefiloj  
kiuj jam aŭdis ĉi paroladon  
pri Amparo, lernu lecionon  
kaj disvastigu jam Esperanton,  
lingvo ĉies por amo kaj paco.

S. Ricarte (Valenci



KONTRAKTO de aliĝo de HEJS (Hispana Esperanto-Junulara Sekcio, C/ Atocha 98, Madrido) al la kunlaborantaj organizoj en "Koncize".

1. HEJS petas aliĝi al la kunlaborantaro de "Koncize", kun rajto al regula publikigo en propra spaco de la revuo de informoj, pri kiuj HEJS rekte respondecas, kaj al fiksita nombro de ekzempleroj de la revuo.
2. Nuntempe HEJS mendas 100 (cent) ekzemplerojn; tiu kvanto povos esti ŝanĝata en kiu ajn momento per letero al la ĉefredaktoro; estas tamen interkonsentite, ke la kvanto neniel falos sub 50 (kvindek), kio estus rigardata kiel retiriĝo el la kunlaboro en la revuo. La menditaj ekzempleroj estos poŝte sendataj al la adreso de HEJS tuj post la presado.
3. La spaco disponebla por ĉiu kunlaboranta organizo estas fiksita de la Komitato de Koncize. Nuntempe kontraŭ cent ekzempleroj estas rajto al unu plena paĝo de la revuo. La kunlaboranta organizo devigas sin sendi la materialon por tiu paĝo ĝustatempe kaj en taŭga formo por presado, laŭ la specifaj indikoj de la ĉefredaktoro. Ĉiu kroma kosto fontanta el ne-sekvo de tiu ĉi sindevigo estos aparte aldonata al la fakturo. Neĝustatempe sendo povas kaŭzi neaperrigon de la materialo.
4. La menditaj ekzempleroj estos fakturataj surbaze de proporcia divido de la ĝeneralaj kostoj (presado, ktp.) minus la ĝeneralaj enspezoj (reklamoj ktp) je la menditaj kvantoj. La pago de la fakturo devas okazi.



en la daŭro de unu monato post ĝia ricevo (malfrua ricevo devas esti pruvita). La administranto rajtas kunmeti plurajn fakturojn en unu, laŭbezone; specife estas rajtigata fakturado ĉiun sesan monaton. Neplenumo de ĝustatempa pago rajtigas la administranton fakturi interezojn laŭ la kurantaj bankaj normoj en sia propra lando.

5. La aliĝo rajtigas HEJS nomumi unu redaktoron, kiu ankaŭ partoprenos kun voĉdonrajto ĉiujn kunsidojn de la Komitato de Konkize. La menciita redaktoro estos ĉiel rigardata kiel la sola kontakto-homon por ĉio, kio rilatas al la revuo kaj al HEJS-paĝo. Nomumo kaj ŝanĝoj devas esti senprokraste komunikitaj al la ĉefredaktoro.

6. La nuna kontrakto ekvalidos post ratifo fare de la Komitato de Konkize, ĝis maksimume la fino de 1982a jaro; tiun ratifon la ĉefredaktoro tuj komunikos al HEJS, je la ĉekape menciita adreso.

r Konkize

por HEJS

administranto  
uĉjo Kasini  
ĉefredaktoro  
Roberto Saletti

*Roberto Kasini*  
*[Signature]*

la prezidanto  
Miguel Angel Sanchez

*M. A. Sanchez Pardo*  
*[Signature]*

+++++

KRISTNASKA LOTERIO

**45.674**

Mendu jam kiom vi deziros

+++++

# LA FOTO

A. VARNĀ



NUR IOMETE !!!



FOTMUZEO.



MI KREDAS,  
S-RO L.L.Z.,  
KE VI ESTAS  
NEK SUFIĈE  
SERIOZA NEK  
SUFIĈE!  
FOTEMA  
FOTEBLA  
FOTINDA  
FOTENDA.

ĈU VI  
KOMPRENAS?



KION VI  
PREFERAS? PORTRETON?



AŬ  
KARIKATURON?



DO BONE, TRANKVILIĜU...



GRRR!

... KAZ RIDETU...



HA  
HE,  
HI...

KIAĈ!  
FINE,  
MI FARIS  
LA FOTON

MI DEVAS  
FORIRI.  
TIO  
ESTAS  
...

# El la estraro

M. A. Sancho

Kiel la estimata leganto povas konstati per tiu ĉi revuo, HEJS ankoraŭ daŭras viva. La tempo kuras - rapide kaj ĉi tio estas nia unua vivsignalo post - preskaŭ ses monatoj. Tiel longa prokrasto devigas - klarigon.

Certe vi scias, ke en la pasinta tendaro de Logroño estis elektita nova estraro. La antaŭa bezonis tempon por prepari kaj sendi ĉion al la nova sidejo. Kvankam tion ĝi faris sufiĉe rapide elspeziĝis du monatoj kaj duono. Tuj kiam ni ricevis la materialon ni devis serĉi urĝajn ekonomiajn rimedojn ĉar en tiu momento HEJS havis nulon por sia laboro. Ni atingis kelkajn donacojn kaj malfermis bankkonton. Poste ni devis elspezi iom pli da tempo por aranĝi la arĥivon kaj atendi aktualigitan liston de HEF kun niaj membroj. Ni ankaŭ preparis stampilon de la sekcio... Kiam ni finis tion ĉion venis la somero kaj la laboro malrapidis, tamen nia agado daŭris aliloke. Ni partoprenis aktive la Hispanan Esperanto-Kongreson en Malago dum kiu ni propagandis HEJS-n kaj atingis donacojn. La ferio estis pli longa kaj mi mem ĉeestis la Internacian Junularan Kongreson en Loveno. Ni starigis dum ĝi solidajn rilatojn kun TEJO, partoprenis ĝian komitaton kaj subskribis kontrakton kun la internacia revuo "Koncize". Kiam mi revenis al Madrido jam estis septembro kaj nin atendis plian administran laboron.

Nur nun eblis la elsendo de "HEJS-Juneco". Nia ekonomio iomete stabiligis kaj tio permesas aperigi ĝin regule. Ankaŭ "Koncize" atingos vin ĝustatempe. Mi petas pardonon pro la tempo perdita, sed havu la certecon, ke HEJS konvertiĝis en veran asocion kaj ne plu restos projekto ĉiam en preparo.

Alie, antaŭ kelkaj tagoj vizitis nian sidejon - la prezidanto de TEJO A. Wandel kaj la prezidantino de HEF R<sup>a</sup> Uruña. Kun tiu lasta okazis longa dialogo pri la optimisma estonteco de HEJS.

# 'Jogging'-o!

Antaŭ ĉio, kio estas jogging?: la fakvorto "jogging" devenas el la angla lingvo. Ĝi signifas proksimume "kurado". Ĝi estas la maniero, kaj iel arto, kuri, dank'al kio oni akiras nenombreblaj profitojn; sed, precipe, estas metodo pri fizika alĝustigo, taŭga por viroj kaj virinoj ĉiu aĝaj, kiun oni povas praktiki preskaŭ ĉie.

Kiuj estas tiuj profitoj antaŭe menciitaj?. La plejelstarajn mi resumas ĉi-sekve:

-Plimultiĝas la rezisto kaj efiko de kora sistemo kaj spira sistemo.

-Ĝi protektas de la malsanoj originitaj de neaktiveco.

-La spiraj muskoloj akiras elaston kaj moveblecon, pro kio la pulmoj kapablas preni pli grandan kvanton da aero.

-Pliiĝas la kapablo por bruli bruleblaĵon.

-Ĝi havigas abundajn rezervojn energiasjn.

-Ĝi protektas kontraŭ koraj atakoj.

-Ĝi forigas la grason de la sango.

-Ĝi reduktas la grason kaj ĝin konvertas en muskolan fibron.

-Ĝi normaligas la korpan strukturon tiel por malgrasaj personoj kiel por grasegaj.

-Laneregulaĵoj produktataj de menopaŭsio povas mildiĝi pere de jogging.

-Oni povas facile lasi la fumadon.

-Ĝi forigas la mensajn tensiojn.



-Ĉi relaxigas la korpon kaj la menson.

-Ĉi alportas psikologiajn profitojn krom fiziologiajn. -vigloj, ĝojon, optimismon,...

Tiujn ĉi kaj multajn pliajn profitojn oni akiras per regula praktiko de jogging.

Nu, kie kaj kiel ĝin praktiki? Jogging havas la avantaĝa specialaĵon ke, por ĝia praktiko, ne estas necese kompleksajn unstarojn sportajn, malfacilajn teknikaĵojn nek multekostan sportilon. Oni bezonas nur tempon kaj volon.

La plej bonaj lokoj por ĝia praktiko estas la mildaj terenoj (razeno, terfo, firma sablo...), ĉar ĉi, la impakto suferata de la piedo kontraŭ tiaj ĉi supraĵoj mildiĝas kaj evitas lezojn piede ajn, maleolajn kaj krurajn.

Kiam: reale, tiun elekton dependas grandmezure de la respondo de via korpo kaj via menso. Se via vekigo estas rapida, certe, ke al vi ne gravos fari ĝin frue. Aliaj preferas ĝin praktiki nokte, kaj aliaj, pro fiziologia kialo, antaŭ ol tagmanĝi. Se via laboro postulas, ke vi restu grandan parton da tempo sidanta aŭ postulas intensan aktivon mensan, la jogging-a sesio ĵus finiĝanta la taglaboro, liberigos de tensio viajn muskolojn kaj forigos la lacon de via cerbo.

Kiam la klimataj kondiĉoj estas malbonaj, vi povas fari ĝin hejme, pere de "halta jogging" aŭ duonhalta (t.e., kurante sen antaŭeniri, sur la sama punkto aŭ trakurante la koridoro aŭ de iu ĉambro al alia, respektive).

Sportiloj: la grava estas porti vestaĵon ne-malebligantan la komfortan movon. La temperaturo kaj atmosferaj kondiĉoj vin indikos plejprecize la vestaĵaron, kiun vi devas uzi. Por pluraj personoj, la atletaj sportiloj levas la moralon.

La ŝuoj estas la plej grava parto en la vestaĵaro de "jogger". La ĉefa karaktero de bonaj ŝuoj estas: reliefa plandumo (ĝi igas pli bonan alkroĉigon de la piedo sur glataj grundoj); la kalkanumo devas esti sufiĉe alta por mildigi la kolizion kontraŭ la grundo, sed ne tiom, ke vi devu kuri klinanta; metu ŝaŭmajn aŭ kotonajn plandumtegojn internen de la ŝuo por mildigi la koliziojn. Ne estas necese, ke la normala jogger elspezu grandan kvanton da mono por kuristaj ŝuoj. Uzu dikajn ŝtrumpetojn por ke ili sorbu la ŝviton.

Kiel: jogging estas disvolviĝinta tute nature, ekde la marŝado. Kvankam via rapido ne estus pli granda ol tiu de rapida paŝado -eĉ ne estas devige la pli rapida irado-, "jogging" egalas al kurado.

Por praktiki tiun ĉi ekzercon, ne estas necese olimpikĉampiona stilo. Tamen, ekzistas kelkaj reguloj elementaj, kiujn vi devus koni kaj observi.

La ĉefa normo estas, ke via pozo devas esti ĉiam ekvilibra kaj perpendikla rilate al tereno. Kuru rekta, kvankam ne rigida. Ne antaŭenigu la kapon nek la bruston. La ŝultroj devas resti relaxantaj. La mentono, ĉiam paralela al tereno, ĉar rigardi piedon klinigos vian trunkon antaŭen, pro kio la korpa pezo ripozas tute sur la kruroj. La brakoj fleksiĝas kaj moviĝas balanciige inter la brusto kaj la talio, sed nature. Permesu la mildan falon de la piedo moviĝanta unuavice. La stilo "plana piedo" estas la plej konsilinda por la normala "jogger", ĉar la tuta piedo mildigas la kolizion.

La personoj interesitaj pri tiu ĉi temo povas trovi librojn en fakaj librovendejoj.

Gorko Buzuki

Bankokonto de HEJS. Por ĉiuj pagoj:

Cuenta Corriente

Caja de Ahorros y Monte de Piedad de Madrid  
Atocha, 56 MADRID-12

HEJS (Sec. Juv. de la Feder. Españ. de Esperanto)  
Nº 10566000342691

### ANONCTARIPO

- A - unu paĝo: 250 p-toj
- B - duonpaĝo: 125 p-toj
- C - kvaronpaĝo: 75 p-toj
- D - anoncetoj: 5 p-toj por ĉiu vorto (minimume dek vortoj)

—Legata en la tuta Hispanio kaj sendata eksterlandan!!!


—Prezoj sen konkurenco!!!

Sendu la monon al la supra bankkonto.

Sendu la A-B-C-kategoriajn anoncojn jam pretaj.

La D-anoncojn ni mem tajpos.





La 42an Hispanan Esperanto-Kongreson en Malago ĉeestis multaj gejunuloj, videblaj sur la foto, kiuj tre vigligis ĝin. Ni esperas, ke simila sukceso okazos venontjare en Zaragozo (foto de Fernando Soler).

- 1: José Damián Canet: delegito de HEJS en Alakanto.
- 2: Miguel Ángel Sancho Pardo: prezidanto de HEJS.
- 3-4: Francisco Javier Moleón (3) kaj Jorge Camacho (4): redaktoroj de "HEJS-Juneco".
- 5: José María Rodríguez: delegito de HEJS en Kordoŭo.

## **REDAKCIA -n-o-t-o-:**

Vi certe rimarkis, ke la revuo antaŭe ampleksis dudek ok paĝojn, kaj nun dudek. Tio ŝuldiĝas al la fakto, ke HEJS atingis paĝon en la revuo "Koncize" (vidu kontrakton kum ĝi aliloke en ĉi tiu numero), kiu estos dissendata al ĉiuj HEJS-membroj. Krome, nia asocio, kiel junulara sekcio de HEP, havas paĝon en "Boletín". Tial ni opinias nenecesa, ke la revuo estu tiel ampleksa. Tia malampleksigo, cetere, ebligas ion da monŝparo.

Estas decidite, ke "HEJS-Juneco" aperu regule kvarfoje jare, ĉiun trian monaton. Ĉiuj opinioj estas bonvenaj. La artikoloj prefere ne estu pli longaj ol du-tri paĝoj tajpitaj.





MI  
PROTEKTAS  
HEJS

'lastsekunda informo':

HEJS atingis la premion  
SOLER, donacitan de s-ro  
Fernando Soler.

## ERRARROJ:

Ni trobis neniun, kio provas,  
ke nia rebuo estas bona.

LA REDACKIO.



R I M A R K O  
=====

P R I    L A  
=====

K O V R I L O    ! ! !  
=====            ! ! !

La artikolsoifa H. E. J. S. rigardas avide la artikolĉapelon de tiu artikolhavanto. Ĉu vi havas alian artikolĉapelon aŭ almenaŭ artikolbereton? Sendu ĝin al ni (se plena, pli bone) kiel eble plej baldaŭ.

Tio estas, sendu al ni kunlaboraĵojn, desegnaĵojn, spritaĵojn, seriozaĵojn, aĵojn, ktp...

Ni bezonas ĉian helpon, eĉ monan.

Ni volas ĉies opiniojn. Bonvolu skribi al "Madrida Esperanto-Liceo, por HEJS-Juneco, Atocha 98, 4<sup>o</sup>, MADRID-12"

Ni starigis novan fakon en la revuo: "Leteroj al la DIR(ektoro)." La unuan leteron ĉi-fake oni vere sendis al unu el la redakcianoj, ekster ĉiaj esperantistaj aferoj, kaj ni ĝin tradukis kaj publikigas. Tamen, kvankam tiu letero estas primoka, tiu fako ne estas ŝerca, sed tute serioza.

**SENDU LETEROJN AL ĈI TIU FAKO**